**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

Abonu la
Pilo-Eldonaĵojn

EER, PP, END 1977
kune 50,- GM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69



N-ro 4/77 - 25 jan 1977
Aperas ĉiusemajne

## Raporto pri agado de la UEA-prezidanto

Rotterdam (pp) - La prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, d-ro Humphrey Tonkin (35 Violet Lane, Lansdowne PA, 19050, Usono) estadis de la 3-a ĝis la 14-a de januaro 1977 en Eŭropo. Pri lia agado dum tiu tempo ni publikigas jenan raporton:

Mardon, la 4-an de januaro okazis kunsido pri eŭropa agado en Bruselo. Krom d-ro Tonkin ĉeestis interalie s-ino J. Hoekstra-Sieders, Nederlando, sekretario de la Eŭropa Esperanto Centro, s-ro Brian Moon de Luksemburga Esperanto-Asocio, s-ro J.G. Catling de Laborgrupo pri eŭropa agado, Bruselo, kaj s-ro G.C. Fighiera de Esperanto-Societo de Bruselo. Oni trakontrolis la nun faratan agadon de la laborgrupo en Bruselo kaj pridiskutis estontan agadon, interalie por plifortigi la kontaktojn inter la laborgrupo kaj la Eŭropa Esperanto Centro.

De vendredo, la 7-a ĝis dimanĉo, la 9-a de januaro okazis la kunsido de la Estraro de UEA en Rotterdam, pri kiu Pilo-Press detale raportis en n-ro 2/77.

Vendredon, la 7-an de januaro, vespere, d-ro Tonkin prelegis ĉe Esperanto-Grupo "La Verda Stelo", Antverpeno, Belgujo, en ĉeesto de proks. 60 personoj pri la temo "Urbo kaj Kamparo: La Literaturo de Kontrastoj."

Lundon, la 10-an de januaro, la UEA-prezidanto ĉeestis neformalan kunsidon pri eŭropa agado kun reprezentantoj de la Luksemburga Esperanto-Asocio, interalie por plani agadon de UEA kunlige kun la baldaŭa konferenco de la Eŭropa Komisiono en Luksemburgo pri la lingva barilo.

Merkredon, la 12-a de januaro, d-ro Humphrey Tonkin partoprenis kunsidon de la Loka Kongresa Komitato de la 62-a Universala Kongreso de Esperanto, Rejkjaviko.

Ĵaŭdon, la 13-an de januaro, d-ro Tonkin renkontiĝis kun prof. Andri Isaakson, sekretario de la Islanda Nacia Komisiono pri UNESKO cele al kunlaboro en plenumado de la ĉeftemo de la 62-a Universala Kongreso "La Rajto je Komunikado". Prof. Isaakson promesis sian kunhelpon en efika realigo de la ĉeftemo.

**************************

## Greka Vespero

Triesto (pp) - Jam anticipe la Triesta Esperanto-Asocio festis la datrevenon de la "Semajno de Internacia Amikeco" aranĝinte grekan vesperon, al kiu estis invititaj ankaŭ aŭtoritatuloj kaj membroj de loka greka komunumo. La prezidanto de la Triesta Esperanto-Asocio, s-ino Elda Doerfler Rupini salutis la gastojn, kaj per donaco de la fama "Dia Komedio" en la Esperanto-traduko de Peterlongo, ŝi omaĝis al la greka komunumo. Ties vicprezidanto, s-ro Spiridiono Nikolaido danke parolis bondezirante, ke tiu ĉi unua renkontiĝo estu fruktodona komenco de estonta kunlaborado. S-ino Anita Altherr montris kaj komentis serion da diapozitivoj pri Grekujo, Ateno kaj la tie okazinta 61-a Universala Kongreso. Tosto al amikeco trans limoj, al Grekujo kaj Esperanto inde kronis vesperan kunvenon.

Honore al niaj mortintoj

Bruno Gahler, Glinde, mortis neatendite pro pulmotumoro la 5-an de januaro 1977. Li devenas el Norda Bohemio kaj estis ĉie konata kaj ofte mokata ĉiama propagandisto kaj kunaranĝanto de sudetgermanaj renkontiĝoj inter Saksio, Silezio kaj Bohemio. Ekde la jaro 1920 li estis abonanto de Heroldo de Esperanto (tiam Esperanto Triumfonta), do supezeble unu el la plej malnovaj abonantoj.

Post reveno el militkaptiteco li ekloĝis en Glinde apud Hamburg, kie li baldaŭ sukcesis nomigi la vojon, kie li loĝis, "Esperanto-Weg". Bruno Gahler estis fervora aŭskultanto de Esperanto-elsendoj. Lia nomo ofte estis citata en la leterkestoj speciale de Radio Romo kaj Zagrebo.

Pastro Henrik Paruzel, Zabrze, Pollando, mortis la 18-an de januaro 1977 sekve de terura kolizio, kiam li per aŭtomobilo hejmenveturis el Romo. Pastro Paruzel estis la redaktoro de la "Biblia Revuo", aŭtoro de "Muzilo" kaj kunlaboris en la nova traduko de la Biblio. Li estis unu el la konstruantoj de la IKUE-Centro en Romo. Radio Vatikana en sia Esperanto-elsendo de la 23-1-77 disaŭdigis intervjuon kun la mortinto, en kiu li parolis pri siaj por-Esperantaj laboroj. La intervjuo estis farita nur kelkajn tagojn antaŭ sia morto okaze de sia restado en Romo.

*****************

Kolektado de insignoj preferata ŝatokupo

Zagreb (pp/mĝ) - Ĝis antaŭ nelonge la kolektado de plej diversaj objektoj, insignoj troviĝis en la lasta vico, sed dum la lastaj jaroj ĝi okupas la unuan lokon en pluraj landoj. Nia verda stelo, la bela kaj simpatia simbolo de nia lingvo kaj movado, ankaŭ meritas esti kolektata kaj konservata por estontaj generacioj.

Por ni, kompreneble,la plej interesaj estas la kongres-insignoj (UEA, SAT, IFEF, naciaj kongresoj), kiuj rapide fariĝas historie valoraj studobjektoj. Pro limigita eldonkvanto ili ne cirkulas en la mondo kiel la poŝtmarkoj. Kiam aperis la unua Esperanto-insigno, kiuj kongresoj eldonis insignon, en kiuj landoj aperis la plej multaj, kiu insigno havis la plej malgrandan kaj kiu la plej grandan eldonkvanton, kaj similaj demandoj, jen materialo pristudinda por insignokolektantoj. Iuj pli fervoraj jam havas 350 insignojn, kiel ekz. la ĉeĥaj samideanoj Ladislav Fiala el Poděbrady kaj Vlada Hasala el Hodonin, sekretario kaj redaktoro de Bulteno por Kolektantoj de Esperanto-insignoj. Ankaŭ en aliaj landoj troviĝas rekorduloj, ekz. en Jugoslavio Marinko Ĝivoje, Zagreb, kiu posedas ĉirkaŭ 250 Esperanto-insignojn diversajn kaj ankaŭ duoblaĵojn. Okazis ankaŭ kelkaj renkontiĝoj de kolektantoj de Esperanto-insignoj - la unua en septembro 1974 en Opava - , kaj estus bone dum universalaj kaj landaj kongresoj aranĝi tiajn renkontiĝojn.

Najbarlanda Esperantista Kunveno

Pecs (pp/mĝ) - De la 10-a ĝis la 19-a de julio 1977 en Abaliget, turisma ripozejo apud Peĉ, Hungario, okazos la jam tradicia Internacia Renkontiĝo Naturamika (IREN). En la kadro de tiu renkontiĝo okazos ankaŭ la unua Najbarlanda Esperantista Kunveno por Jugoslavoj, Hungaroj, Aŭstroj, Italoj, Grekoj kaj Bulgaroj (NEK). Estonte NEK povus okazi ĉiujare, ĉiam en alia lando kun la celo malmultekoste pasigi kelkajn tagojn kun alilandaj esperantistoj kaj interamikiĝi kun ili. Interesatoj peti aliĝilon de la ĉi-jara peranto: Antonije Sekelj, Kondina 24, YU-11000 Beograd.

******************

Pilo-Press, ĉiusemajna informilo, jara abonkotizo 30,- GM
Pagu al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1,
Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851

## Pri la Esperanto-Elsendoj de Radio Vatikana

## Propono fondi Klubon de aŭskultantoj

Radio Vatikana, la radiostacio de la Katolika Eklezio, elsendas de la 2.1.1977 regule ankaŭ en Esperanto, nome ĉiudimanĉe, inter la 21,05 ĝis 21,15 horo, laŭ MET, sur la meza ondo de 196 m kaj sur la kurtaj ondoj de 41 m, 31 m, 25 m.

Mi mem, subskribinto, povis kapti ĝin bonege, unuan fojon, la 16.1.77, kiam mi havis la plezuron povi aŭskulti la agrablan, konatan voĉon de nia kara s-ano P. Giacinto Jacobitti, dominikano en Romo, de pola saleziano P. Leszek Irek kaj de iu hungarino pri la honoro al Maria, informoj el la katolika mondo kaj aktualaĵoj.

Ĉar la stacio de Romo/Vatikano dum la printempaj monatoj ricevos tute novan, supermodernan antenon, kiu ebligos ĉie en la mondo relative bonegan kapton anstataŭ la ĝisnuna "ondosalato", estas varme rekomendinde, ke la katolikaj esperantistoj precipe, sed ankaŭ la aliaj gesamideanoj nepre skribu al Radio Vatikana post aŭskultado de la Esperanto-programoj pri siaj spertoj, rilate kapteblecon kaj la enhavon, por ke la teknikistoj de la stacio la eventualajn malglataĵojn povu elimini kaj la redaktoroj de la Esperanto-sekcio povu ĉiam pli perfektan, pli plaĉan, pli bonan programon prezenti.

La germanaj gesamideanoj facile povas trovi la lokon en sia aparato, ĉar la Esperanto-programon ĉiam antaŭiras germanlingva programo, disaŭdigata inter 20,30 - 21,05 horo, tiel ke la unuan parton de tiu ĉi tempo okupas prelego pri iu grava temo, ekz. la 16.1.77 pri la unueco de la kristanoj, kaj poste sekvas muzika aldonaĵo.

Por efike subteni la agadon de la Esperanto-redakcio mi proponas fondi Klubon de Aŭskultantoj, kiuj morale devigas sin, ke ili de tempo al tempo skribu al Radio Vatikana pri siaj spertoj, proponoj, kritiko kaj tiamaniere helpas al la redaktoroj. Krome ili mendu kvanton da elegante presitaj monataj programkajeroj, kun la intenco dividi ilin inter konatuloj, en preĝejoj, paroĥejoj por tiamaniere gajni novajn aŭskultantojn al Radio Vatikana.

La tempo de la t.n. "roma radio-kuirejo" estas forpasinta. Radio Vatikana volas prezenti programon, komune kun ni kaj por ni ellaboritan.

Post lego de tiu ĉi ĝojiga informo bonvolu, kara leganto, nepre preni la plumon aŭ vian skribmaŝinon kaj esprimu al Radio Vatikana vian ĝojon kaj gratulon al la nova programero kaj postulu samtempe ĝentile la vere belaspektan, plurlingvan (ankaŭ en Esperanto! sur kvarona paĝo!) monatan programkajeron!

Multe da sukceso kaj ĝojo deziras al vi kore via

D-ro J. Kondor, gimnazia instruisto
en Lahnstein, Johannesgymnasium, FRG

*****************************

Rimarkigo de Pilo-Press

Volonte ni publikigas la ĉi-supran artikolon de d-ro J. Kondor. Speciale ni salutas la proponon pri fondo de Klubo de Aŭskultantoj de Radio Vatikana. Kiu do interesiĝas pri tiu iniciato turnu sin al d-ro J, Kondor, Alte Schloßstr. 25, D-5450 Neuwied 21.

Sed kompreneble necesas ankaŭ subteni la aliajn radio-staciojn, kiuj elsendas en Esperanto. Jam de la komenco de sia apero Pilo-Press regule raportas pri la elsendoj de la radio-stacioj en Esperanto kaj klopodas pli intense popularigi ilin. Do aŭskultu kaj skribu al la Esperanto-redakcio de Radio Varsovio, Vieno, Zagrebo, Romo, Pekino, Svisa Kurtonda Radio, IBRA Radio, Radio Vatikana ktp.

Adresaro de Radiostacioj

Ĉi-sekve ni publikigas la adresojn de radiostacioj, kiuj regule elsendas en Esperanto:

ORF, Esperanto-Redakcio, A-1136 Wien, Aŭstrio

Radio Peking, Esperanto, Peking, Ĉinio

Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00182 Roma, Italio

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O.B. 46, PL-00-950 Warszawa, Poll.

Svisa Kurtonda Radio, Esperanto, CH-3000 Bern 15, Svislando

IBRA Radio, Box 396, S-101 25 Stockholm, Svedio

Radio Zagreb, Esperanto, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio

Radio Vatikana, Redazione Centrale, Esperanto, Città de Vaticano

Aŭskultu regule al la Esperanto-elsendoj kaj skribu regule al la redakcioj laŭ la supraj adresoj.

Nova konkurso de Pola Radio

Pola Radio anoncas novan konkurson por siaj eksterlandaj aŭskultantoj. 10-tagaj ekskursoj tra Pollando, valoraj objektaj premioj estas gajneblaj de tiuj aŭskultantoj kiuj respondas al jenaj demandoj:

- En kio, laŭ via opinio, konsistas la diferencoj kaj la similecoj inter I kaj II Stokholmaj Alvokoj. Kial tiuj ĉi alvokoj havas tiel gravan signifon?
- Kion vi opinias pri la kunvoko de laŭvica Packongreso en Pollando, en la 1977 j.? Kion vi scias pri la aliaj kongresoj/ simpozioj, seminarioj ktp./, kunvokataj de la Monda Pac-Konsilantaro en Pollando?

Respondo jam al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La leterojn oni sendu laŭ la adreso: Pola Radio, poŝtkesto 46, PL-00-950 Varsovio, Pollando - en kovertoj per la devizo "Konkurso", ĝis la 31-a de marto 1977 j.

Esperanto en Radio

Ekde kelkaj monatoj Radio Romo aŭdigas en ĉiu elsendo ankaŭ Esperanto-kanton el kasedo. Tiun kasedon oni povas mendi ĉe la Esperanto-redakcio. Sed Radio Roma ne estas engaĝita en la afero, sed estas nur peranto. Aperis nun nova eldono de la kasedo, interalie en plibonigita kvalito kaj kun aldono de tri pliaj kanzonoj ĉerpitaj el la disko "Jen nia mondo".

Ekde 1977 redaktoro d-ro Antonio De Salvo denove revenis al Romo, post preskaŭ unujara restado en Venecio. D-ro De Salvo skribe plendis ĉe la Teknika Servo de la Itala Radio, pro la fakto, ke Romo kaj Vatikano elsendas en Esperanto en la sama tempo kaj sur tre proksimaj frekvencoj; li ne postulis ŝanĝon de la vatikana elsendo, sed prefere de la itala, tiel ankaŭ plenumante la dezirojn de multaj aŭskultantoj de Radio Roma, kiuj plurfoje petis diversajn tagojn, horojn kaj frekvencojn. Laŭ la unuaj reagoj, ŝajnas, ke pri la problemo de la Esperanto-elsendo oni parolos en la sino de la speciala kontrola komisiono de la itala registaro, kiu prizorgas la elsendojn al eksterlando. Aŭskultantoj de Radio Roma skribu amase plendante pro la nebonaj ricev-kondiĉoj kaj petante novajn tagojn, horojn, frekvencojn kaj sendo-direkton.

Varsovio. En la dimanĉa Esperanto-anguleto kadre de la germanlingva programo oni povis aŭdi recenzon de Eŭropa Esperanto-Revuo, n-ro6/76.